

Veranstaltungshinweise

Unsere **Esperanto-Lernrunden** für: a) Anfänger mit Vorkenntnissen (Stufe A2¹⁾): Do. 19:00-20:30 Uhr, Gemeindehaus der kath. Kirchengemeinde St. Willehad, St.-Willehad-Str. 37, 26954 Nordenham; b) Fortgeschrittene (Stufen B1, B2, C1¹⁾): Do. 19:45-21:15 Uhr, Ev.-luth. Kirchengemeinde Brake, Kirchenstr. 24, 26919 Brake. – Unsere **monatlichen Vereinstreffen** sind vorgesehen für den **16.10.2008**, 19:30 Uhr, in der Gaststätte *Zur Kogge*, Rathausplatz 7, 26931 Elsfleth, und **28.11.2008 (Weihnachtsfeier)**, 19:00 Uhr, in der Gaststätte *Giacomo*, Bahnhofstr. 59a, 28919 Brake. Aktuelles und Einzelheiten können unserer Netzseite <http://www.esperanto.de/unterweser/aranghoj.htm> entnommen oder bei Anne Höpken, Tel.: 04731-4837, erfragt werden. Gäste sind willkommen. Außerdem:

19.10.2008	5-a Rata Rendevuo, Emmerthal
31.10.-02.11.2008	Esperanto-Sprachkurse, ICH ²⁾
22.11.2008	EMAS ³⁾ -Kulturtag, Bremen
20.-24.05.2009	Printempa BARo 2009, Bad Münde
23.-29.05.2009	61a Kongreso de IFEF ⁴⁾ , Triest, Italien
28.05.-03.06.2009	Eŭropa Esperanto-Kongreso zusammen mit dem 86. Deutschen Esperanto-Kongress, Herzberg
07.-12.07.2009	Kultura Esperanto-Festivalo, Helsingør, Dänemark
18.-25.07.2009	65. Jugendweltkongress (IJK), Liberec, Tschechien
25.07.-01.08.2009	94. Esperanto-Weltkongress, Białystok, Polen

¹⁾Erläuterung d. Stufen: http://www.europass.cedefop.europa.eu/img/dynamic/c1349/type.FileContent.file/ELPEexamples_de_DE.pdf, S. 2; auf Esp.: <http://www.edukado.net/pagina/Legejo/149/#691>

²⁾ICH: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, Tel.: 05521-5983

³⁾EMAS: Esperanto-Ligo de Malsupra Saksio (Landesverb. Niedersachsen im Dt. Esp.-Bund e. V.)

⁴⁾IFEF: Internacia Fervojista Esperanto-Federacio; Nachkongress: 30.05.-01.06.2009

Impressum:

Zeitschrift: Esperanto Gazeto (ISSN 1861-3330)
Erscheinungsweise: dreimal jährlich als Druckausgabe und elektronische Ausgabe, Netzseite:
<http://www.esperanto.de/unterweser/gazeto.htm>

Herausgeber: Esperanto-Gruppe Unterweser e. V.
(<http://www.esperanto.de/unterweser>)

Information und Redaktion: Anne Höpken, Magdalenenstr. 27,
26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837
Dörte Bierkämper, Tel.: 04404-3368
Andreas Kück, Tel.: 04702-5044
Mario Müller, Tel.: 04732-1373

Bankverbindung
(für Beiträge und Spenden): Raiffeisenbank Oldenburg eG
BLZ 28060228
Kontonummer 1200160000
(Kassenwartin: Dörte Bierkämper)

E G U - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.

Esperanto Gazeto

N-ro 23

ISSN 1861-3330

Okt. 2008 – Jan. 2009

EGU-Info: <http://www.esperanto.de/unterweser>



Scheveningen (Niederlande), 23.07.2008: Im Programm des 93. Esperanto-Weltkongresses waren auch Ausflüge an den Nordseestrand, der in dem obigen Foto in einem großen Bild an einer Mauer gezeigt wird.

Scheveningen (Niederlande), 23-a de Julio 2008: En la programo de la 93-a Universala Kongreso de Esperanto estis ankaŭ ekskursoj al la Nord-Mar-plaĝo, kiu en la supra foto estas montrata en granda bildo sur muro.

Pri Komputeko

Ĉu al vi esperantisto iam anoncis sendi "majlon"? Aŭ ĉu ŝi aŭ li parolis pri "digitala" televidricevo? Tiaj strangaj novvortajoj ne estas bezonataj: Ekzistas la libro *Komputeko – prikomputila terminokolekto* de Yves Nevelsteen (ISBN 978-80-969533-9-4; 94 paĝoj; prezo: 6 €). Ĝi entenas la tradukojn de ĉirkaŭ 7500 anglalingvaj prikomputilaj terminoj en Esperanto: Unuopa "e-mail" estas ne "majlo", sed "retmesaĝo", la sistemo de "e-mail" estas "retpoŝto", kaj la televidricevo funkcias nun "ciferece". Pliaj ekzemploj: "webcam" estas "retkamerao", kaj "LAN" estas "loka reto". La projekto *Komputeko* (mallongigo de *prikomputila terminokolekto*) ne celas anstataŭi jam ekzistantajn iniciatojn (ekz. *Komputada Leksikono*), sed ilin enigis kiel fontindikojn. En la retejo de tiu ĉi dekomence plurlingva projekto, <http://www.komputeko.net>, oni trovas tradukojn de anglaj terminoj en Esperanton, la francan, germanan, hispanan, katalunan, nederlandan kaj polan, kiom tiaj tradukoj jam estas enmetitaj de la projektanoj aŭ aliaj kontribuantoj. *Komputeko* do montras, ke Esperanto estas moderna lingvo, per kiu oni povas esprimi ĉion. – Andreas

Über Komputeko

Hat Ihnen ein Esperantist schon mal (auf Esperanto) angekündigt, eine „majlon“ zu senden? Oder sprach sie oder er von einem „digitala“ Fernsehempfang? Solche sonderbaren Wortneubildungen werden (im Esperanto) nicht gebraucht: Es gibt das Buch *Komputeko – prikomputila terminokolekto* („Komputeko – Sammlung von Rechner-Fachausdrücken“) von Yves Nevelsteen (ISBN 978-80-969533-9-4; 94 Seiten; Preis: 6 €). Es beinhaltet die Übersetzung von etwa 7500 englischen Rechner-Fachausdrücken ins Esperanto: Eine einzelne „e-mail“ ist nicht „majlo“, sondern „retmesaĝo“ (wörtlich: „Netznachricht“), das „e-mail“-System ist „retpoŝto“ (wörtlich: „Netzpost“), und der Fernsehempfang funktioniert jetzt „ciferece“ (wörtlich: „ziffernartig“). Weitere Beispiele: „webcam“ ist „retkamerao“ (wörtlich: „Netzkamera“), und „LAN“ ist ein „loka reto“ (wörtlich: „lokales Netz“). Das Projekt *Komputeko* (Abkürzung von *prikomputila terminokolekto*) zielt nicht darauf ab, bereits bestehende Initiativen (z. B. *Komputada Leksikono*) zu ersetzen, sondern bezieht sie als Quellenangaben ein. Im Netzauftritt dieses von Anfang an mehrsprachigen Projektes, <http://www.komputeko.net>, findet man Übersetzungen von englischen Fachausdrücken ins Esperanto, Französische, Deutsche, Spanische, Katalanische, Niederländische und Polnische, soweit solche Übersetzungen von Projektmitgliedern oder anderen Mitwirkenden eingegeben worden sind. *Komputeko* zeigt also, dass Esperanto eine moderne Sprache ist, mit der man alles ausdrücken kann. – Andreas

Nia somerfesto

(Rodenkirchen, 30-a de Aŭgusto 2008)

En bonega, suna vetero dek esperantistoj el nia regiono unue vizitis la bronzepokdomon en Rodenkirchen (Hartwarderwarp). Tiu domo estas rekonstruaĵo de unu el la domoj, kies restojn oni trovis en 1971 dum la elfoslaboroj por la nova senakviga kanalo de Strohausen. La trovitaĵoj

Enigma

	1	2	3	4	5	6
1					7	
2				10		
3		8				11
4		9				
5					12	
6						

Ĝuste ordigite, la literoj en la grizaj ĉeloj rezultigas la nomon de la ĉefurbo de sudorient-Azia insulregno.

Zu Neujahr

Will das Glück nach seinem Sinn
Dir was Gutes schenken,
Sage Dank und nimm es hin
Ohne viel Bedenken.
Jede Gabe sei begrüßt,
Doch vor allen Dingen:
Das, worum du dich *bemühst*,
Möge dir gelingen.

Wilhelm Busch

Por novjar'

Se venas felich', lau sia senc'
Ion bonan donaconte,
Por tio sen multe da pripens'
danku, akceptu volonte.
Chia donaco bonvenadas,
Tamen, jeno antau chio:
Pri kio vi bone *penadas*,
Havu sukceson en tio.

El la germana esperantigis Andreas

Ni estis petitaj atentigi pri la **3-a Internacia Konkurso Kristnasko, bilde kaj poezie** por geknaboj de 6 ĝis 14 jaroj; limdato por kontribuajoj: 10-a de Novembro 2008. La konkurso estas lanĉita de Triesta Esperanto-Asocio, C. P. 601 Trieste Centro, 34132 Trieste, Italujo. Pli da informoj: <http://groups.yahoo.com/group/ikue/message/3820>.



**Ĝojan kristnasko-feston kaj bonan gliton en la novan jaron!
Ein frohes Weihnachtsfest und einen guten Rutsch ins neue Jahr!**

- La 12-an de Oktobro 2007 *Nordwest-Zeitung* (Aus der Region Landkreis Wesermarsch Nordenham) publikigis la artikolon "Esperantisten pflanzen Tulpen namens 'Esperanto' – Unterweser-Gruppe beteiligt sich am Stadtjubiläum – Fahrt zum Weltkongress geplant" ("Esperantistoj plantas tulipojn nome 'Esperanto' – Subvisurgo-grupo partoprenas urbjubileon – Planitas veturo al UK").
 - La 12-an de Decembro 2007 *Wesermarsch am Mittwoch* publikigis la artikolon (kun bildo) "Esperantos mit neuen Terminen, im Juli 2008 geht's zum Weltkongress – Viele Aktivitäten" ("Esperant[ist]oj kun novaj aranĝdatoj, en Julio 2008: ek al la UK – Multe da aktivadoj").
 - La 28-an de Majo 2008 *Nordwest-Zeitung* (Aus der Region Landkreis Wesermarsch Nordenham) publikigis la artikolon (kun bildo) "Esperanto-Tulpe mit Farbklang von Rosarot und Grün" ("Esperanto-tulipo kun koloroj rozruĝa kaj verda").
 - La 9-an de Julio 2008 *Wesermarsch am Mittwoch* publikigis la artikolojn (kun bildo) "Esperantos sorgen für blühende Tulpen" ("Esperant[ist]oj zorgas pri florantaj tulipoj") kaj "Esperantos beim Weltkongress" ("Esperant[ist]oj ĉe la UK").
 - La 11-an de Julio 2008 *Nordwest-Zeitung* (Aus der Region Landkreis Wesermarsch Nordenham) publikigis la mallongan atentigon "Esperanto-Kongress" ("Esperanto-kongreso") pri la okazonta 93-a UK.
 - La 31-an de Julio 2008 *Nordwest-Zeitung* (Aus der Region Landkreis Wesermarsch Nordenham) publikigis la artikolon (kun bildo) "Esperanto-Gruppe reist nach Rotterdam – Weltkongress tagt in Holland – Zehn aus der Wesermarsch dabei" ("Esperanto-grupo vojaĝas al Roterdamo – UK kunvenas en Nederlando – Partopreno de dek el Wesermarsch").
 - La 31-an de Julio 2008 *Kreiszeitung Wesermarsch (Stadt Nordenham)* publikigis la artikolon (kun bildo) "Internationaler Austausch in Rotterdam – Sprachen als Schatz der Menschheit – Esperanto-Gruppe Unterweser besuchte den Weltkongress" ("Internacia eŝanĝo en Roterdamo – Lingvoj kiel trezoro de la homaro – Esperanto-Gruppe Unterweser vizitis la UK-on").
 - La 1-an de Aŭgusto 2008 *Nordwest-Zeitung (Aus der Region)* publikigis intervjuon kun Uwe Joachim Moritz (kun bildo) kun la titolo "Ein wahrer Schatz der Menschheit" ("Vera trezoro de la homaro"). Li estas prezidanto de la iniciato "Plattdütsch hört daarbi!" ("La platdiĉa apartenu!").
 - La 8-an de Aŭgusto 2008 *Nordwest-Zeitung (Aus der Region Landkreis Ammerland)* publikigis la artikolon (kun bildo) "Mit 'Saluton' die Welt begrüßen" ("Per 'Saluton' saluti la mondon") pri la Esperanto-aktivado de Alke Geveke kaj la UK 2008.
 - La 10-an de Aŭgusto 2008 *Wesermarsch am Sonntag* publikigis la artikolon "Esperantos beim Weltkongress" ("Esperant[ist]oj ĉe la UK").
- Anne, Andreas



Klubanoj ĉe la UK 2008

montris, ke ĉirkaŭ 900 antaŭ Kristo, do en la malfrua bronzepoko, setlis homoj ĉi tie en la "Marsch" (marsko, aluviaĵo, ŝlimgrund-ebenaĵo) ĉe la germana bordo de Norda Maro. (Pli malnovan setlejon oni ĝis nun tie ne trovis.) Kiel konstrumaterialoj estis uzitaj ĉefe fraksenoligno, alnoligno kaj fragmito. Krome la trovitaĵoj pruvas, ke en la setlejo vivis bronzforĝisto. – En la dua parto de la somerfesto la partoprenantoj en la restoracio *Friesenheim* amuziĝis per keglado kaj vespermanĝis. – Andreas



Bronzezeit Haus in Hartwarderwarp /
Bronzepokdomo en Hartwarderwarp


Unser Sommerfest (Rodenkirchen, 30.08.2008)

Bei herrlichem, sonnigem Wetter besichtigten zehn Esperantisten aus unserer Gegend zunächst das Bronzezeit Haus in Rodenkirchen (Hartwarderwarp). Das Haus ist die Nachbildung eines der Häuser, deren Überreste 1971 bei den Ausschachtungsarbeiten für das neue Strohauser Sieltief gefunden wurden. Die Funde zeigten, dass um etwa 900 v. Chr., also in der Spätbronzezeit, Menschen hier in der Marsch an der deutschen Nordseeküste siedelten. (Eine ältere Siedlung fand man dort bisher nicht.) Als Baumaterialien wurden hauptsächlich Eschenholz, Erlenholz und Schilf verwendet. Außerdem belegen die Funde, dass ein Bronzeschmied in der Siedlung lebte. – Im zweiten Teil des Sommerfestes amüsierten sich die Teilnehmer im Restaurant *Friesenheim* beim Kegeln und aßen zu Abend. – Andreas

93-a Universala Kongreso de Esperanto (Roterdamo, 19-a ĝis 26-a de Julio 2008)

Inter la 1845 kongresanoj el iom pli ol 70 landoj estis ankaŭ Anne kaj Anke. Jen iliaj raportoj. – Anne: "En la merkredo, la ekskurtago, Anke, Günther, Thomas kaj mi vizitis la Centran Oficejon de UEA je la 11:00 horo. Por ke ne tro multe da personoj samtempe venu, UEA estis disdoninta biletojn (kun elekteleblaj tago kaj horo). Estis grave ĉeesti akurate. Kiu malfruiĝis, ne rajtis eniri. Sinjorino Katarzyna Marciniak, sekretariino de UEA, gvidis nin tra la Centra Oficejo: La librovendejo situas proksime al la enirejo kaj estis barita, tial ni povis nur envidi. En la unua etaĝo situas la oficejoj, ekz. tiuj de la sekretarino, kasistino kaj aliaj estraranoj. En la kelo estas la Biblioteko Hector Hodler. En la dua etaĝo estis ekspozicio pri la centjara historio de UEA. La gvidado finiĝis post unu horo, kaj alia grupo venis. Poste ni faris propran ekskurson piede tra Roterdamo. Ni admiris multajn interesajn grandajn konstruaĵojn. Je la fino ni vizitis la muzeon Boijmans Van Beuningen. La ĉefa muzeo de Roterdamo posedas vastan kolekton de klasika kaj moderna arto." – Anke: "En la mardo Günther kaj mi

faris duontagan ekskurson per historia tramo tra Roterdamo. Ĝi komenciĝis je la 9:00 horo antaŭ la kongresejo ĉe tramhaltejo. La tramo el la jaro 1931 portis nin



*Es muss nicht immer Walzer sein:
Das Jugendprogramm des
Weltkongresses bot etliches an
Unterhaltung / Ne bezonas esti
ĉiam valso: La junulara programo
de la UK prezentis multe da amuzo*

al la plej ĉarmaj kaj interesaj kvartaloj de la urbo, tra la ĉefaj turismaj allogaĵoj. La ekskursgvidanto, nederlanda esperantisto, klarigis ĉion. Ni vidis la Eŭromaston kun la kosmoturo, la havenon, la havenan muzeon, la kubdomojn, la moskeon ktp. La tramo veturis ankaŭ trans la Erasmo-ponton. Tiel ni konatiĝis kun Roterdamo. Poste ni partoprenis en la *Rondo 'Kato'* (kun prelego de Francisco Veuthey) kaj vendrede en la tuttaga ekskurso al Vlissingen. Pro konstruoj de scenejoj (somerkarnavalo) ni devis iri al alia bushaltejo proksime al la kongresejo. Ni, ĉirkau 25 personoj, veturis laŭlonge de la grandega haveno de Roterdamo. Post unu horo la aŭtobuso haltis en la parkejo de plezurparko. Post la pluveturo ni vizitis en bona vetero la urbon Vlissingen kun ĝia

historia centro apud la maro. Sed unue ni manĝis kune en restoracio. Ĉe la tablo sidis anglo, nederlandano, du francoj (patro kun filo) kaj ni. Ankaŭ ni gustumis varman kokedon. Tio estas malgranda kaj mallonga fritita rulaĵo el panraspaĵo kun viando. Tiu ĉi speco de manĝaĵo originas el Francujo. Nekutime por ni! En la muzeo *Het Arsenaal* ni informiĝis pri la mara historio de Zeeland kaj konatiĝis kun la vivmaniero de piratoj. Dum la vojaĝo reen ekstere estis varme. La klimatizilo en la aŭtobuso malvarmigis tro, kaj kelkaj homoj frostsentis. Ankoraŭ ĝustatempe por la *Internacia Arta Vespero* ni atingis la kongresejon.” – Anne, Anke

93. Esperanto-Weltkongress (Rotterdam, 19.-26.07.2008)

Unter den 1845 Kongress-Teilnehmern aus etwas über 70 Ländern waren auch Anne und Anke. Hier ihre Berichte. – Anne: „Am Mittwoch, dem Ausflugstag, besichtigten Anke, Günther, Thomas und ich das Zentralbüro des Esperanto-Weltbundes (UEA) um 11:00 Uhr. Damit nicht zu viele Leute gleichzeitig kamen, hatte die UEA Eintrittskarten verteilt (mit wählbarem Tag und wählbarer Uhrzeit). Es war wichtig, pünktlich zugegen zu sein. Wer zu spät kam, durfte nicht rein. Frau Katarzyna Marciniak, UEA-Sekretärin, führte uns durch das Zentralbüro: Die Buchhandlung liegt nahe am Eingang und war versperrt, daher konnten wir nur hineinschauen. Im ersten Stock liegen die Büros, z. B. die der Sekretärin, Kassenwartin und anderer Vorstandsmitglieder. Im Keller ist die Bibliothek Hector Hodler. Im zweiten Stock war eine Ausstellung über die 100jährige UEA-Geschichte. Die Führung endete nach einer Stunde, und eine andere Gruppe kam. Dann machten wir einen eigenen Ausflug zu Fuß durch

Rotterdam. Wir bewunderten viele interessante große Bauwerke. Am Ende besichtigten wir das Museum Boijmans Van Beuningen. Rotterdams Hauptmuseum besitzt eine umfangreiche Sammlung klassischer und moderner Kunst.” – Anke: „Am Dienstag machten Günther und ich einen halbtägigen Ausflug mit der historischen Straßenbahn durch Rotterdam. Er begann um 9:00 Uhr vor dem Kongressgebäude an einer Straßenbahnhaltestelle. Die Straßenbahn aus dem Jahr 1931 brachte uns an die bezauberndsten und interessantesten Viertel der Stadt, durch die wichtigsten touristischen Attraktionen. Der Ausflugsleiter, ein niederländischer Esperantist, erläuterte alles. Wir sahen den Euromast mit dem Kosmosturm, den Hafen, das Hafenumuseum, die Würfelhäuser, die Moschee usw. Die Straßenbahn fuhr auch über die Erasmus-Brücke. So lernten wir Rotterdam kennen. Dann nahmen wir an der *Rondo 'Kato'* (Kreis 'Katze'; mit einem Vortrag von Francisco Veuthey) und am Freitag an dem ganztägigen Ausflug nach Vlissingen teil. Wegen Bühnenaufbauten (Sommerkarnaval) mussten wir zu einer anderen Bushaltestelle in der Nähe des Kongressgebäudes gehen. Wir, etwa 25 Leute,



In Delft / En Delft

fuhren entlang dem riesengroßen Hafen Rotterdams. Nach einer Stunde hielt der Bus auf dem Parkplatz eines Vergnügungsparks. Nach der Weiterfahrt besichtigten wir bei gutem Wetter die Stadt Vlissingen mit ihrem historischen Zentrum am Meer. Aber zunächst aßen wir gemeinsam in einem Restaurant. Am Tisch saßen ein Engländer, eine Niederländerin, zwei Franzosen (Vater und Sohn) und wir. Auch wir kosteten eine warme Krokette. Das ist eine kleine und kurze fritierte Rolle aus geraspeltem Brot mit Fleisch. Diese Art Speise stammt ursprünglich aus Frankreich. Ungewöhnlich für uns! Im Museum *Het Arsenaal* informierten wir uns über die maritime Geschichte Zeelands und lernten die Lebensart von Piraten kennen. Während der Fahrt zurück war es draußen warm. Die Klimaanlage im Bus kühlte zu sehr, und einige Leute froren. Noch rechtzeitig zum *Internacia Arta Vespero* (Internationalen Kunstabend) erreichten wir das Kongressgebäude.” – Anne, Anke

Pri la porpublika agado de nia klubo

Ankaŭ en la lastaj dek du monatoj klubanoj kontribuis al tio, ke de temp' al tempo pri-Esperantaj letero de leganto kaj artikoloj aperis en la gazetaro:

- La 6-an de Marto 2008 *Nordsee-Zeitung* publikigis la leteron de leganto Anne Höpken "Esperanto würde auch zu mehr wirtschaftlicher Gerechtigkeit beitragen" ("Esperanto kontribuas ankaŭ al pli da ekonomia justeco").
- La 8-an de Oktobro 2007 *Kreiszeitung Wesermarsch (Stadt Nordenham)* publikigis la artikolon (kun bildo) "Esperanto-Gruppe Unterweser pflanzt im Museumspark 300 Esperanto-Tulpen" ("Esperanto-Gruppe Unterweser plantas 300 Esperanto-tulipojn en la muzeoparko").